

1922-02-28-sergeant-fousek_1

Mardon de Karnavalo

Mia kara amiko,

Jen mi estas tute sola en tiu granda domo & mi pripensas al vi. Mi sidas je la fenestro en nia manĝa ĉambro & mi povas vidi tiele la maskitulojn kiuj trapasas. Sed verdire ili tute malinteresas min.

Karnavalo en la Nordo estas tute malbela pro kutima malvarmo & malbela vetero. Hodiaŭ, strange la vetero estas bela. Sed ho-ve! Mi ne povas eliri ĉar de nove, de post hieraŭ mi malsaniĝis. Mi neniam vere estis tute kuracita & ofte suferas pro la gorgo & febro. Nun, mi timas novan malvarmumon & ne eliras. Sed mi skribas kontraŭe al mia volo. Mi volis komenci dirante al vi kiel mi estas feliĉa pri via filineto. Sed zorgu ŝin multege, forte. Ŝi estas tiel „fragila“ estaĵo & malvarma venteto povus denove remalsanigi ŝin. Ho! Kiel mi komprenas viajn dolorojn, vian malkvieton. Feliĉe ke ĉio finiĝis.

Sed, vere, la vetero estis tiel malbona ĉie ke oni ne miras pri tiom da malsanaĵoj. Mi ŝatus iri al Niceo, en la suno. Mi sendube pli bone fartus & mi ne timus tiel forte la plej malgrandan venton aŭ malvarmon. Eble mi retrovus mian bonan gajan kutiman humoron, ĉar de post 5

1922-02-28-sergeant-fousek_2

semajnoj mi estas malĝoja pro malsano, malforteco & pro datrevenoj de la malsano & la morto de mia patrino.

Mi nur ludis unu fojon de preskaŭ 3 monatoj al „bridĵo“. Do, vi vidos, ke mi ne estas tiel freneza kiel vi imagas pro ĝi.

Grandegan dankon pro via aminda letero. Ĝi estas unu el la plej belaj & mi ŝategis ĝin. Vi petas longan leteron de mi, sed mi ĉiam timas, ke miaj skribaĵoj tedos vin. Ĉu vere, ne? Vi nomas mian lastan, spontana. Estas mia tuta karaktero – spontana & prudenta. Mia spontaneco ĉiam batalas kontraŭ mia prudenteco. Cetere, mi estas plena de kontraŭecoj: sentema, praktika, k. t. p. Eble vi rimarkis tion.

Ĉu Karnavalo ekzistas en via lando? Mi kredas ke ĝi nur ekzistas en latinaj landoj. En Niceo, ĝi daŭras 10 tagojn. Ĉie alie, 2 tagojn = Dimanĉon & Mardon, 6 semajnoj antaŭ Pasko. Nun en la urbo estas grandega amaso de popolo & kelkaj naskitaj personoj kiuj „intrigas“ la aliajn & diras laŭte ĉion kion ili volas pri ili. Ofte, oni rakontas kaŝitajn sekretojn & „skandalojn“. Vespere estas grandaj maskitaj baloj. Mia servistino iros kiel „Carmen“ kun fianĉo kiel „Toreador“. Nur la laboristoj & geservistoj

1922-02-28-sergeant-fousek_3

elspezas grandajn sumojn por la amuzado. Antaŭ la milito ili ŝparis monon – nun la milito ŝanĝigis ĉion ili ĉiam malprudente elspezas.

Mi ricevis hodiaŭ ankoraŭ longan letero de d-ro Léon Zamenhof kiu petis min skribi longe al li pri la vivo & morto, pri materialeco & spiritualeco!!! Li parolis pri la momento kiam ni revidiĝos en Varsovio. En Beziers (suda Francujo) oni faros kongreseton & oni invitos lin sed bedaŭrinde pro monŝanĝo li ne iros.

Ĉu vi vidis novan eldonon de B. E. S.? Ĉar jen mi ricevas multajn landojn & komunikaĵojn el via lando adresintaj al mi tiele: S-ino A. Lucieu, adv.edz. Mi imagas ke eble oni malkomprenis mian nomon. Mi sendos P.K. al s-ro Berger. Ĉu kiam mi skribos sur miaj leterkovertoj: „Ĉesko-Slovenka“ mi estas prava?

Unu bona korespondanto mia, Sibrava el Znojmo, iomete disrevigis min. Li skribis la 8-an de Dec. dirante ke li ne skribos antaŭ la 20-a. De post tiu momento nenian leteron! Sed P. K. dirante ke mi estu pacienca ĉar li havas grandan laboron & ke post kelkaj tagoj li reprenos sian longan & oftan korespondon. Hieraŭ novan P. K. petante novan paciencon pro granda laboro & aldonante ke li ludos la XIII. de Marto la

1922-02-28-sergeant-fousek_4

rolon de Karolus IV en „Nokto en Karlštejn“! Li klarigis al mi la komedion & rakontis pri la Kastelo. Tio memorigis al mi tiun vesperon kie mi preskaŭ dormis dum tiu malbone ludata teatraĵo. Ĝi estis la plej granda malsukceso de la Kongreso.

Ĉu vi ne samopinias kiel mi. Kiam oni vidis „Ifegenio en Tauride“ (Dresdeno) „Mazeppa“ & „Halka“ (Krakovo) „Mistero de Doloro“ (Barcelone) „Kaatje“ (Antverpo) k. t. p. Tiu Nokto en Karlštejn malfavore impresas kongresanon.

9 ½ vespere

Amikino vizitis min je la 5-a & teon trinkis. Poste, mia edzo & mia filo (kiu revenis el la Universitato por la Karnavalaj libertempoj) eniris. Ni vespermanĝis & mia frato kun fianĉino (ĝentila anglanino) alvenis por preni Lucien & mian filon & nun ili kvarope foriris por viziti la grandajn kafejojn & rigardi la „maskitulojn“. Belaj kostumoj ĉeestos la balojn sed grandega amaso de personoj ĉie. Nun, oni kriegas sur la bulvaroj, oni kantas, oni freneziĝas. Mi malamas tion. Mi ne povas eliri pro febzo & malvarmumo; alie, mi certe estus akompaninta la 4 aliajn.

Kiel malvarme ĉe vi? Hodiaŭ tie sur mia balkono +15° & en la sunaj horoj + 24°!!! Sed estas varme hodiaŭ.

Poincaré & Lloyd George venis tien ankaŭ hieraŭ por nova „konference“ (Kunveno). Mi tre bone vidis tute proksime, la lastan. Tio kaŭzis grandan movadon en la urbo, nature.

1922-02-28-sergeant-fousek_5

Jes, mi tre rememoras D-ron Beneš. Li donis vesperfestenon al kelkaj Esperantistoj. Dankon por la bildo de Foerster. Inteligenta kapo.

Ekzistas multaj Esperantistoj en Boulogne. Sed la grupoj ne plu funkcias vere. Nia grupo: „Verda stelo“ oficiale ekzistas. La prezidantino loĝas 27 Bd Marelte & metas en nian leterkeston, ĉiun komunikaĵon kiun ŝi ricevis (ĉar ŝi ne volas legi lin) & mi devas legi ilin & respondi se mi opinias ke tio estas necese. Mi ricevas multajn, speciale germanajn. Mi havis tre interesan el Tokio. Nur, ge-roj Sergeant iris al Kongresoj de longatempe sed multaj aliaj ekzistas. Mi ne plu volas okupiĝi pri Esp. en Boulogne. Ĉiuj kiuj volis lerni Esp. jam lernis. La aliaj pli ŝatas al „Cinéma“ & la dancadojn k. t. p.

Kiel estus agrable nun momente, se anstataŭ ol skribi tion-ĉi, mi povus rigardi vin sidantan je mia dekstro, ĉirkaŭ la tablo, viaj manoj apogitaj sur la velura ruĝa tapiŝo, & se mi povus rakonti buŝe ĉion. Eble vi estus pli ŝatanta eliri kun la aliaj vidi la dansantajjn, kantantajjn popolojn maskitajn. Sed, se vi ŝatus pli, harmonion, vi pli bone farus restante apud mi & vi aŭdus la venton kiu ruliĝas en la kamentubo (fajrejo) (ĉar la fajrejoj ekzistas ĉe ni sed sen fajro ĉar ni havas „le chauffage central“)

1922-02-28-sergeant-fousek_6

Vi aŭdus melodiojn en tiuj grandegaj arboj antaŭ la domo.

Tiuj sonoj en la branĉoj ĉiam parolas al mi & diras tiom da diversaj sekretoj. Ho! Nun grupo da frenezuloj trapasas la kantante. Kiaj krioj, kiaj malbelaj sonoj! Kaj tio daŭras ĝis la 6-a matene & tiam oni iros sur la marbordon & oni bruligas „Mardi gras“ figuro de la reĝo de la Karnavalo. Morgaŭ oni pentos & oni ricevos cindrojn sur la en preĝejo & oni estos senkulpigata!!!

Kiaj kreduloj!!! Ĉu oni devas diri ke kreduloj estas feliĉaj!!!

Kiel vi trapasis terurajn momentojn – 40° ĉe via Eva. Jes, vere la gepatroj suferas terure, precipe la patrinoj. Diru al via edzino kiel mi simpatis kun ŝi!!!

Mi kredas ke ne multaj iros al Helsinki. proksime & multekoste & ne sufiĉe interese – ĉu ne?

Estas bedaŭrinde se vi ne plu okupiĝas pri Esperanto. Kial do? Ĉu vi jam finis vian grandan tradukon? Alia s-ro skribis dvoje al mi de „Nove Mesto n/Metuji“, Bohemujo. Mi ne scias kie ĝi staras. Mi ne havas ĉeĥan landkarton & ĉiuj nomoj estas ŝanĝataj. Grandan dankon por via ĵurnalo. La religio & kredoj de „nia Majstro kiuj entroviĝas estas tute la miaj. Faru al aliaj tion, kion vi ŝatus ke oni faru al vi mem.“

Nun, kara amiko, mi forlasos vin. Dankon profundan por via letero kiun mi ne atendas dum tiel longa tempo kiel kutime (sed vere ĝi respondis al mia lasta & pro tio ne ŝajnas tiel longe). Mi esperas tutkore de via filino tute resaniĝos. Ĉu vi pledas multe? Ĉu vi legis la proceson pri „Landru“? Oni „gilotinis“ lin antaŭ kelkaj tagoj.

Multajn amikajn pensojn & salutojn & memorojn

Alice Sergeant